

LA PERMANENTA REVOLUCIO

ORGANO DE LA
BOLSEVISTOJ-
LENINISTOJ.
PROPAGANDAS LA
IV-AN INTERNACION
SOLA TEORIA MARKSISMA
ORGANO EN ESPERANTO.



ANSVARHAVENDE Aage Kjeldsø, Helsingør, Danmark. TRYK Sv. Johannsen, Kbh.
PREZO 0,20 dkr por unu kajero, APERAS monato, ABONO por 1 jaro 2,40 kr.
EDITITA de la Propaganda Komitato de Levigo, konsente de I.K.L.
ADRESO Svend Johannsen, Danic, Kopenhago, Australiensvej 24. (Esperanto)

DUA JARO... SESA KAJERO... UNUA EDITO... KOPENHAGO... 1936... 18 PAĜOJ...

LA ENHAVO:

LA KVARA INTERNACIO K LA MILITO. 2-a parto (fino), i.a.
Sovetio k la milito, la 3-a internacio k la milito, la "revol." pacifismo, la etburĝoj, la defajtismo, revol. politiko kontraŭ milita, la 4-a internacio k la milito.
Stalinismo: PRI LA 7-A MONDKONGRESO DE KOMINTERNO, de L. T r o c k i j
Centrismo: PROGRAMO DE LA SVEDIA SOCIALISTA PARTIO.
Sennaciismo: ĈU RUGA FASISMO EN SOVETIO? I.a. esenco de la faŝ., ĉu S. ŝtatkapital. ŝtato?... Kial oni ne povas paroli pri r.i.?
plue: RECENZEJO. — "LA GVIDANTO" — SENNACIISTAJ MENSOGOJ. — ktp.

PREZARO:

Prezo por 1 kajero en Dan., Sved., Norveg., 0,20 kr., en Germ. 0,15 RM, en Holand. 0,10 fl., Svisio 0,15 fr., en Francio 0,70 fr., en Usenc 0,05 doll., en Ĉekoslov. 1 kr.
en aliaj landoj 0,25 tanaĵ kronoj. Ni ankaŭ akceptas int. poŝtajn respondekuponejn. Jarabono = prezo por 12 kajeroj.

LA KOMUNISTOJ MALŜATAS FAŝI SIAJN OPINIOJN E INTERENCIOJN: ILI DEKLARAS
KIAŝE KE ILIAJ CELOJ NUR POVAS ESEI ATINGITAJ PER LA PERFORTA REVOLUCIO
DE CIA ĜIANUNA SOCIORDO. TREMU LA REGANTAS. PLASOJ ANTAŭ LA KOMUNISTA
REVOLUCIO. LA PROLETOJ HAVAS MEMION POR PERDI IROV SIAJ ĜENCOJ.
SIA HAVAS MONDOJ POR GAJHI.

80 KOLEKTOJ DE ĈIUJ LANDOJ, UNUIGU!

Internationales Esperanto-Museum in Wien
Wien I, Hofburg, Batthyánystrasse 9, 1. Stock

LA KVARA INTERNACIO KAJ LA MILITO. Tria dabrigo. Sovetio k la Imperiis.
 La tutmonda proletaro eĉ ne rezignos je la defendo de Sovetio tiukaze se ĉi tiu estas devigata fari militakiancon kun iu imperiisto kontraŭ la aliaj. Sed en ĉi tiu kazo ankoraŭ pli ol en ĉiu alia sekurig-
 os la tutmonda proletaro al si tutecan politikan sendependecon de la sovetsocietismo k tiel de la kominternaj burokrataro.

14. Estante nun kiel antaŭe decida k senkondiĉa defendanto de la laborista ŝtato: en la batalo kontraŭ la imperiismo, fariĝos la tutmonda proletaro tamen ne alianculo de la imperiismaj alianciloj de Sovetio. La proletaro de la kapitalista ŝtato alianca kun Sovetio rezervas al si sian nepacigeblan kontraŭecon kontraŭ la imperiisma registaro de sia propra lando tutece. Tiusence ne ekzistos diferenco inter ĝia politiko k la politiko de la proletaro en la lando batalanta kontraŭ Sovetio. Tamen en la karaktero de la praktikaj agadoj povas rezulti gravaj diferencoj, estigitaj de la konkreta situo. Absurda k krima estas ekzemple, se okaze de milito inter Sovetio k Japanio, la usona proletaro sabotus la forsendon de usonaj armiloj al Sovetio. Kontraŭe aktus agoj kiaj strikoj, sabotado ktp nepre devo de la proletaro en la lando militanta kontraŭ Sovetio.

15. La nepaciga proleta opozicio kontraŭ la imperiistaj alianciloj de Sovetio devus disaliĝi baze de la interna klasa politiko je la unua flanko, la imperiismaj celoj de la koncerna registaro, la malfidela karaktero de ĝia alianco, ĝia spekulado je burĝa revolucio en Sovetio ktp aliflanke. La politiko de la proleta partio en la alianca lando kiel en la kontraŭula imperiisma lando devas sekve esti direktita je la revolucia faligo de la burĝaro k la konkero de la potenco. Nur tiuvoje oni povas estigi veran aliancon kun Sovetio k savi la unuan laboristan ŝtaton je la katastrofo.

16. Interne de Sovetio estigos la milito kontraŭ la imperiista intervenco sendube onĉon de malfalsa batalemo. Ĉiuj kontraĉdickcioj k antaŭonismoj ŝajnos esti forigitaj aŭ minimume malpli gravaj. La junaj generacioj de laboristoj k kamparistoj, elkreskintaj el la revolucio, montros ĉe la fronto potencon dinamikan forton. La centraligita industrio montros malgraŭ ĉiuj mankoj k eraroj grandajn avantaĝojn en la militliverado. La registaro de Sovetio sendube havigis grandajn nutraĵprovizojn, kiuj sufiĉos por la unua periodo de la milito. La generalstabo de la imperiismaj ŝtatoj sufiĉe bone scias ke la Ruĝa Armeo estas potenca kontraŭulo, k ke la batalo kun ĝi kostas multe da tempo k necesigas terure streĉi siajn fortojn.

17. Sed ĝuste la longa daŭro de la milito neeviteble senmaskigos la kontraĉdickcion de la transira ekonomio de sovetic kun ĝia burokrata planado. La novaj grandiozaj entreprenoj montriĝos en multaj kazoj esti morta kapitalo. Sub la influo de la plej necesaj bezonoj de la ŝtato al ĉiuj uzeblaj objektoj plifortiĝos la individuakismaj tendencoj de la kamparistoj, k la centrifugaj fortoj en la kolĥozoj kreskos daŭre. La regado de la nekontrolita burokrataro aliĝos en milito ktdiktatorecon. La manko de vivanta partio kiel kontrolanto k reguliganto gvidos al ekstrema akumulo k pliakrigo de la kontraĉdickcioj. Eble oni eĉ povas atendi kurssanĝojn al individuakisma produktado en la agrarekonomio, metio ktp, altiro de eksterlanda "aliancila" kapitalo, kresko en la eksterlandkomerca monopolio, malplifortigo de la ŝtata kontrolo je la trustoj, pliakrigo de la konkurenco inter la trustoj, bataloj inter trustoj k laboristoj ktp. En la politika direkto povas ĉi tiuj procezoj signifi la perfektigon de la bonapartismo, kun la koncernaj sanĝoj en la propraj rilatoj. Per aliaj vortoj: kaze de longa milito, ĉe pasiveco de la tutmonda proletaro, fariĝos la internaj socialaj kontraĉdickcioj en Sovetio la instigilo al la burĝa-bonapartisma kontraŭevolucio.

18. La politikaj konkludoj deduktendaj el tio estas evidente:
 a. Savi Soveticon kiel laboristan ŝtaton kaze de longa streĉiga milito, nur povas la proleta revolucio en la okcidento.
 b. La preparo de la proleta revolucio en la "amikaj", neŭtralaj k en la kontraŭulaj landoj estas pensbla nur se la avangardo de la tutmonda proletaro estas tute sendependa de la sovetsocietismo.
 c. La oferpreta subteno de Sovetio kontraŭ la imperiismaj armeoj devas esti samtempa kun revolucia marksista kritiko je la milita k diplomacia politiko de la sovetic registaro, k interne de Sovetio kun la formigo de vere revolucia partio de bolŝevistoj-leninistoj.

internacio inter defajtismo k socialpatriotismo. En Germanio oni faris el la batalo kontraŭ la faŝismo konkurencon kontraŭ ĝi sur la fundamento de la naciismo. La devizo pri la «nacia liberigo» metita flanken de la devizo pri la «socia liberigo» karikaturas la revolucionan perspektivon k ĉiukaze ekskludas la defajtismon. En la problemo de la Saar-distrikto komencis la kom. partio per naŭza humilumado antaŭ la naci-socialismo k nur pro internaj skismoj ĝi ĉesis tion. Kian devizon propagandos la germania sekcio dum la milito - ĉu «malvenko de Hitler estas la pli malgranda malbono»? Sed se la devizo de la nacia liberigo estis ĝusta sub la «faŝistoj» Müller k Brüning (germ. regnokancelieroj), kiel ĝi do povas nevalidiĝi sub Hitler? Aŭ ĉu la naciismaj devizoj nur taŭgas por pazaj tempoj, sed ne por la milito? Vere, la epigonoj de la leninismo faris ĉi ĉon por sin k la laboristojn profunde konuzigi.

50. La revolucia nepovo de la 3-a internacio estas la rekta sekvo de ĝia idiota politiko. Post la germania katastrofo proviĝis la politika mensignifo de la t. n. kompartioj en ĉiuj landoj kie ili havigiĝis. La franca sekcio, kiu tute ne povis mobiligi kelkajn dekmilojn da laboristoj kontraŭ la koloniarbo en Afriko, sendube montriĝos esti ankoraŭ pli bankrota en la momento de la t. n. «nacia danĝero».

51. La batalo kontraŭ la milito estas nepensebla sen la revolucia mobiligo de la amasoj de la laboristoj en urbo k kamparo k postulas samtempe direktan influon je la armeo k militŝiparo unuflanke, la transporto aliflanke. Sed ĉi tiu je la soldatoj estas nepensebla sen influo je la laborista k kamparista junularo. La influo je la transporto premias bonajn poziciojn en la sindikatoj. Sed la 3-a internacio helpe de la Profinternio perdis ĉiujn poziciojn en la sindikatoj. Samtempe ĝi izoligis sin de la laborista junularo. Paroli sub tiaj kondiĉoj pri batalo kontraŭ la milito signifas, semi iluziojn. Por iluzioj ni ne havas lokon, okaze de imperiisma atako je Sovetio montriĝos la Tria internacio esti nenio.

LA «REVOLUCIA» PACIFISMO K LA MILITO.

52. La «etburĝa» «maldekstra» pacifismo kiel memstara tendenco eliras de tio ke oni per iuj specialaj rimedoj ekstere de la socialista revolucio povas sekurigi la pacon. La pacifistoj en artikloj k paroladoj predikas «abomenon je la milito», ili subtenas la individuan milit-servrifuzon, predikas bojkoton k ĝeneralstrikon (pli ĝuste: la miton de la ĝeneralstrikon) kontraŭ la milito. Tre «revoluciaj» pacifistoj eĉ havas nenion kontraŭ tio se oni parolas pri ribelo kontraŭ la milito. Sed ĉiuj, kune k unuope, havas nenian supozeton pri la nedisigebla ligo inter la revolucio, la klasbatalo k la politiko de la revolucia partio. La revolucio estas por ili ne la rezulto de longdaŭra k sistema klopodado, sed literatura minaco al la adreso de la reganta klaso. Utiligante la naturan pacamon de la popolo, sed ne montrante al ĝi la ĝustan elirvojon, fariĝas la pacifistoj senkonscie al sojlo de la imperiismo. En milito staros niaj pacifistaj «alianciloj» plejparte ĉe la fronto de la burĝaro, k uzos la estimon, kiun havigis al ili la reklamo de la 3-a internacio por la patriota desorganizigo de la proletava avangardo.

53. La amsterdama kongreso kontraŭ la milito k la pariza kongreso kontraŭ la faŝismo, organizitaj de la 3-a internacio, estas klasikaj ekzemploj kiel ili interŝanĝas la revolucionan klasbatalon kontraŭ etburĝa politiko de demonstracioj, efektplenaj paradoj, potenkinaj vilaĝoj. Je ĉi tiu tago post la bravaj protestoj kontraŭ la abstrakta milito, disiĝis multekoloraj elementoj, kunigitaj de la kultrisregisoroj, en ĉiujn direktojn k montriĝis esti nekapablaj, faru ion kontraŭ la vera milito.

54. La anstataŭigo de la proletava unuecfronto, t. e. de batalkontraktoj inter laboristaj organizoj, per bloko de la komunistaj burokratoj kun etburĝaj pacifistoj, kiuj nur je dekonco estas honestaj konfuzuloj, dum la plej multaj estas nur karieristoj, gvidas al tuteca eklektikismo en taktikaj problemoj. La stalinistoj montras kiel specialan atingon de la Barbusse-Münzenberg-kongresco, ke ili kunigis ĉiujn specojn de la «batalo» kontraŭ la milito, - humanismaj protestoj, individuaj milit-servrifuzoj, eduko de la «publika opinio», k eĉ ĝeneralstrikon k ribelon. Metodoj kiuj en la vivo kontraŭdiras unu al la alia, k praktike nur estas aplikeblaj, se oni batalas kontraŭ aliaj, estas nun montrataj kiel elementoj de harmonia tute. La rusaj «socialrevolucioj», kiuj en la batalo kontraŭ la carismo predikis «sintezan taktikon» - alianco kun la liberaluloj, individuaj tercoj k amasa batalo, estis la modelo de serioza grupiĝo kompare kun la patrioj de la amsterdama bloko.

LA PERM.REV....DUA JARĈ.....SESA KAJERO.....KVARA PAĈO.....

la laboristoj devas bone memori ke la bolŝevismo kreskis en la batalo kontraŭ la populara eklektikismo!

LA ETBURĜOJ K LA MILITO.

55. La batalo kontraŭ la militdanĝero povas plej facile alproksimiĝi la kamparistojn kaj la malsuprajn tavolojn de la urbogantaro al la laboristaro, ĉar por ili estas la milito ne malpli ruiniga ol por la proletaro. Ankaŭ nur tiuvoje oni povas, ĝenerale dirite, eviti la milito per ribelo. Sed la kamparisto ankoraŭ pli malfacile ol la laboristo lasas sin kapti en la nevolucia vojo helpi de sablonoj, abstraktaĵoj kaj malplenaj komandoj. La epigonoj de la leninismo, kiuj 1923-24 faris kursaĝon sub la devizo "la vizitaĵo al la vilaĝo!" pruvis ke ili tute ne kapablis, kondviki la standardo de la komunismo ne nur al la kamparistoj sed ankaŭ al la kamparlaboristoj. La Krestinterno (kamparista internacio) mortis nerimarkite, sen ia ajn mortprediko. La tria internacio proklamita "komkeron" de la kamparistaj amasoj montriĝis ĉiam esti necesaraĵo, se ne nur inventaĵo. Speciale en la regiono de la kamparista politiko ricevis la bankroto de la Tria internacio tre evidentigan karakteron, sed ĝi esence nur estis la neevitebla rezulto de la rompo inter Kominternon kaj proletaro.

La kamparistaro nur tiukaze iros la vojon de la revolucia batalo kontraŭ la milito se ĝi estas efektive konvinkita de la kapablo de la laboristoj, gvidi ĉi tiun batalon. La ŝlosilo al la venko sekve estas en la fabrikoj kaj entreprenoj, la revolucia proletaro devas iariĝi efektiva forto antaŭ ol kamparistoj, metiistoj kaj marŝos kun ĝi en unu vico.

56. La etburĝaro en urbo kaj kampare ne estas homogena. La proletaro nur trovas alianculojn en ĝia plej malsupra tavolo, la malriĉaj kamparistoj, preskaŭproletoj, stratkomercistoj, subpremataj kaj disigitaj homgrupoj, kiuj pro siaj vivkondiĉoj ne havas la eblon, gvidi memstaran batalon. Ĉi tiun larĝan tavolon de la etburĝoj superas tiuj pintoj kiuj tendencas al la burĝaro kaj kiuj specialiĝas la politikaj karieristoj, ĉu de demokratpacifista, ĉu de iasista tipo. Dum ĉi tiuj sinjoroj staras en la opozicio, ili uzas la plej senbridan demagogion, por poste sin vendi des pli multekoste al la grandburĝaro.

La krimo de la Tria internacio estas tio ke ĝi en la batalo por la revolucia influo je la vera etburĝaro, t.e. je ĝiaj plebejaĵaj amasoj, anstataŭigas per teatraj blckoj kun ĝiaj hipokritaj pacifistaj gvidantoj. Anstataŭ misiamigi la ĉilastajn, ĝi ekvipas ilin per la autoritato de la oktobra revolucio, kaj lasas la subprematajn malsuprajn tavolojn de la etburĝaro iariĝi poliĉike al la viktimo de iliaj perŝaj provokatantoj.

57. La revolucia vojo al la kamparistaro kondukas tra la laboristaro. Por atingi la kondiĉon de la vilaĝo, devas la progresintaj laboristoj mem ree atingi kondiĉon al la standardo de la proleta revolucio. Tion oni nur povas eikigi per ĝusta politiko ĝenerale, kaj ĝusta kontraŭmilita politiko speciale.

LA "DEFAŬTISMO" EN LA IMPERIISTA MILITO.

58. Tiukaze kiam temas pri batalo inter kapitalistaj landoj, rifuzas la proletaro de la militanta lando decide, en la nomo de la milita venko de la burĝaro ĉiuj siajn proprajn interesojn, kiuj ja finfine kongruas kun la intereso de la nacio kaj homaro. La formulo de Lenĉn: "La malvenko estas la pli malgranda malbono" ne signifas ke la malvenko de la propra lando estas la pli malgranda malbono kompare kun la malvenko de la kontraŭula lando, sed ke la milita malvenko, efikita per la evoluo de la revolucia movado, estas por la proletaro kaj por la tuta popolo nekompareble pli avantaĝa ol la milita venko, efikita de la "sankta unuenco" (interklasa pago). Karl Liebknecht ionis la nesuperitan formulon de la proleta politiko en la milito: "La ĉefkontraŭulo de ĉiu popolo staras en ĝia propra lando: la venkinta proleta revolucio ne nur rebonigos la ditaktojn, kaŭzitaĵojn de la malvenko, ĝi eĉ estigos definitivan sekuron kontraŭ pliaj militoj kaj malvenkoj. Ĉi tiu dialektika sinteno al la milito estas la plej grava elemento de la revolucia edukado kaj sekve ankaŭ de la batalo kontraŭ la milito.

59. La aliigo de la imperiisma milito en la civitanan militon estas la ĝenerala strategia tasko al kiu devas esti subordinita la tuta laboro de la proleta partio dum la milito.

La sekvoj de la franca-prusia milito en 1870-71 kiel de la imperiisma milito de 1914-18 (pariza komaro, februaro kaj oktobra revolucioj en Rusio; Revolucioj en Germanio, Aŭstrio-Hungario, ribeloj en areoj de militanta landoj) kontrastas nerakuzeble kun la hodiaŭa milito inter kapital-

istaj ŝtatoj sekvigas la klasmliton interne de ĉiu ŝtato k ke estas la tasko de la revolucia partio prepari la venkon de la proletaro en ĉi tiu milito.

60. La spertoj de la jaroj 1914-18 pruvas plue ke la devizo por la paco tute ne kontraŭas al la strategia formulo de la defajtismo, kontraŭe, ĝi eĉ disialfigas potencon revolucionan forton, speciale, ĉe longa daŭro de la milito. Pacifisman, t. e. trompan, endormigan, paralizan karakteron havas la devizo "por la paco" nur se demokrataj k aliaj politikistoj jonglas per ĝi, se la pastraĉoj sendas pceptpreĝojn ĉielon, por la plej baldaŭa finiĝo de la masakro, se la "homamikoj", inter ili ankaŭ la socialpatriotoj, ploras petegas siajn registarojn, plej rapide fari pacon sur justa fundamento. Sed la pacdevizo ne havas ion komunan kun la pacifismo, se ĝi venas el la laboristaj kvartaloj k la tranĉeoj, se oni kunigas ĝin kun la devizo pri la interiratiĝo de la soldatoj en la malamikaj armeoj, se ĝi kunigas la subpremaĉojn kontraŭ la subpremaĉoj. La revolucia batalo je la paco kiu daŭre fariĝas pli grandioza k pli kuraĝa, estas unu el la ĉefaj vojoj al la "aliigo de la imperiis ta milito en la civitanan militon".

MILITO, FAŜISMO K LA ARMIGO DE LA PROLETARO.

61. Milito postulas "sanktan unuecon". Ĝin povas la burĝaro atingi pro la hodiaŭaj kondiĉoj nur per la faŝismo. Tiel fariĝas la faŝismo al la plej grava politika faktoro de la milito. Batalo kontraŭ milito signifas batalo kontraŭ faŝismo. Ĉiu revolucia programo pri la batalo kontraŭ la milito ("defajtismo", "Aliigo de la imperiista milito al la civitana milito" ktp.) fariĝos malplena vorto se la revolucia avangardo ne povas sukcese kontraŭi al la faŝismo.

Postuli de la burĝaj ŝtato la senarmigon de la faŝistaj bandoj, kiel tion faras la stalinistoj, signifas reprediki la malnovajn frazojn de la germ. socialdem. k de la aŭstromarksismo. Ĝuste wels k Otto Bauer "postulis" de la ŝtato, ĝi senarmigu la faŝistojn por tiel sekuri la internan pacon. "Demokratar registaro certe povas - se tio estas por ĝi avantaĝa - senarmigi iujn faŝistajn grupojn, sed nur por kun des pli granda fervoro ankaŭ senarmigi la laboristojn aŭ minimume malebligi ke ili havigas al si armilojn. Morgaŭ jam ebligos la burĝa ŝtato al la hieraŭ "senarmigitaj" faŝistoj, duoble sin armi k uzi la armilojn kontraŭ la senhelpa proletaro. Turni sin al la ŝtato, t. e. al la kapitalo kun la postulo senarmigi la faŝistojn, signifas semi fiajn demokratajn iluziojn, endormigi la proletaron k senmoraligi ĝin.

62. La ĝusta revolucia politiko konsistas el tio, elirante de la fakto ke la faŝistaj bandoj havas armilojn, celo de la memsirmo estigi armigitajn laboristatamentojn, k ne laciĝante alvoki la laboristojn al memarmado. Ĉi tie estas la fokuso de la tuta politika situo de hodiaŭ. La socialdemokratoj, eĉ la plej maldekstraj, t. e. tiuj kiuj estas pretaj remaĉi la ĝeneralajn frazojn pri diktatoreco de la proletaro k revolucio, aŭ tute ne pritraktas la problemon pri la armado de la laboristoj aŭ rekte deklaras tion kiel "himeran", "aventuristan", "romantikan" ktp. Ili proponas anstataŭe (!) propagandon inter soldatoj, kiun ili envenore nek faras nek povas fari. Tia propono nur servas al la oportunistoj por entombigi la problemon de la laborista armado.

63. La batalo je la armeo estas sendube la plej grava parto de la batalo por la potenco. Melaciĝanta k memoferema laboro inter la soldatoj estas revolucia devo de ĉiu vere proletara partio. Tiun laboron oni nur tiukaze povas fari kun sekurigita sukceso preme de ĝusta ĝenerala politiko de la partio. Speciale gravas por la sukceso de la laboro en la armeo en landoj kĉn granda agrarpopolo la agrarprogramo de la partio, k entute sistemo de transiraj devizoj kiuj tuŝas la fundamentajn interesejn de la etburĝaj amasoj k montras al ili la savontan perspektivon.

64. Sed estus naive kredi, oni povus per nura propagando tiri la tutan armeon al la flanko de la proletaro k tiel nenecesigi la revolucion. La armeo estas heterogena k ĝiaj heterogenaj elementoj estas ligataj per la fera kateno de la disciplino. La propagando povas en la armeo estigi revoluciajn ĉelojn, k varbi la simpation de la plej progresintaj soldatoj. Pliĉn ne povas fari propagando k agitado. Ĉpinii ke la armeo je propra iniciato ŝirmas la laboristajn organizojn antaŭ la faŝismo signifas ŝanĝi la krucajn instrukojn de la historio kontraŭ dolĉaj iluzioj. La armeo transiros en siaj decidaĵ partoj dum la revolucia tempo nur tiukaze al la flanko de la proletaro se la proletaro mem pruvas al la armeo ke ĝi estas preta k kapabla por la batalo je la potenco. Tio rice premisas la armadon de la proletaro.

65. Estas tasko de la burĝaro, deteni la proletaron de la konkero de la armeo. Ĉi tiun taskon solvas la faŝismo ne sensukcese, helpe de armitaj ligoj. La plej direkta, plej proksima tasko de la proletaro ne estas la konkero de la potenco sed la defendo de siaj organizoj je la faŝistaj bandoj malantaŭ kiuj staras en certa distanco la burĝa kapitalista ŝtato. Kiu asertas ke la laboristoj ne povas sin armi, tiu per tio nur diras: la laboristoj estas senhelpaj kontraŭe al la faŝismo. Tiam oni ne parolu pri socialismo, proleta revolucio, batalo kontraŭ la milito. Tiam oni disŝiru la komunistan programon kiel metu la marksismon en la arĥivon.

66. Rifuzi la taskon armi la laboristojn, ne kapablas revolucio sed nur impotentaj paciistoj, morgaŭ jam kapitulaciante antaŭ faŝismo kiel milito. La armado estas, kiel pruvas la historio, tre facile organizebla. Se la laboristoj komprenos ke temas pri vivo kiel morto, ili rapide havigos al si la armilojn. Klarigi al ili la politikan situon, sen voli maligi aŭ mildigi ion, forigi ĉiujn «konsolajn» mensogojn, tio estas la unua devo de ĉiu revolucia partio. Kiel oni fakte povas defendi sin antaŭ sia pleja kontraŭulo, se ne kontraŭante al ĉiu faŝista pondaĵo du pondaĵojn, al ĉiu revolvero du revolverojn? Se la faŝistoj havigas al si mafilojn, devas la laboristoj havi la samajn armilojn. Alia respondo ne ekzistas, ne povas ekzisti.

67. De kie preni la armilojn? Speciale de la faŝistoj mem. La senarmigo de la faŝistoj estas hontiga devizo se ĝi estas direktita al la burĝa polico. La senarmigo de la faŝistoj estas tre bona devizo se ĝi estas direktita al la revoluciaj laboristoj. Sed la faŝistaj depotoj ne estas la sola fonto. La proletaro havas centojn kiel milojn da kanaloj por la sinarmado. Ĉi ne forgesu ke ĵa estas la laboristoj kiel nur ili kiuj produktas la per propra mano ĉiujn armilojn. Necesas nur ke la proleta avangardo klare komprenis ke la tasko de la sinarmado estas aktuala. Estas devo de la revolucia partio, preni la iniciaton al la sinarmado de la laboristaj taĉmentoj. Sed por tio oni unue devas esti liberiginta sin de ĉiuj formoj de la skeptikismo, nedecidemo kiel de la paciista babilaĉo rilate al la laborista armado.

68. La devizo pri la laborista milico aŭ memŝirmgrupoj havas nur tiel revolucionan sencan, se temas pri armita milico, alikaze ĝi nur faras kontraŭojn, paradojn kiel de fariĝas memtrompo. Kompreneble estas la armado en la unua tempo tre primitiva. La unuaj lab. memŝirmgrupoj havas nek haŭbicojn, nek tankojn, nek aviadilojn. Sed je la 6-a de febr. en Parizo, en la centro de la militistŝtato, preskaŭ ŝturmis bandoj armitaj per revolveroj kiel bastonoj kun raztrandaĵoj la parlamenton kiel efektivigis la faligon de la registaro. Similaj bandoj morgaŭ jam povas detruigi la redaktojn de la proletaj gazetoj aŭ la sindikatajn domojn. La forto de la proletaro estas ĝia multnombreco. En la manoj de la maso povas la plej primitiva armilo fari miraklojn. Ĉe favoraj cirkonstancoj ĝi povas ebenigi la vojon al pli perfekta armado.

69. La devizo de la unuecironto fariĝas al centrismaj frazo se ĝi de la ĉiujn cirkonstancoj ne estas perfektigata per la propagando kiel aplikado de certaj metodoj en la batalo kontraŭ la faŝismo. La unuecironto speciale necesas por estigi lokajn defendkomisionojn. La defendkom. necesas por konstrui kiel organizi taĉmentojn de la lab. milico. Ĉi tiuj taĉmentoj devas jam de siaj unuaj paŝoj serĉi kiel trovi armilojn. La memŝirmgrupoj nur estas etapo en la vojo al la ĝenerala armado de la proletaro. Aliajn vojojn tute ne konas la revolucio.

LA REVOLUCIA POLITIKO KONTRAŬ LA MILITO.

70. Unua kondiĉo por la sukceso estas la eduko de la partikadroj en la ĝusta kompreno por ĉiuj cirkonstancoj de la imperiista milito kiel ĉiujn akompanantajn procezojn. Ve al la partio kiel en ĉi tiu aktualega problemo sin limigas al ĝeneralaĵoj kiel abstraktaj devizoj! La samaj okazantaĵoj super ĝia kapo evoluigas kiel ĝin detruas. Necesas estigi specialajn cirkulojn por studi la politikajn spertojn de la milito 1914-18 (ideologia preparado al la milito de la imperiismo, ĝusta informado de la publika opinio de la staboj per la patriota gazetaro, rolo de la antitezo: dancado kiel ĝiako, grupigoj en la proletaro, izoligo de la marksistaj elementoj kiel).

71. Por la revolucia partio estas speciale kriteria la momento de la ekmilito. La burĝa kiel socialpatriota gazetaro superŝutos kiel kun radio kiel kino la laboristojn per ondoj de ŝovinista veneno. La historio de la bolŝevista partio, kiel estas ĉi tute falsigita, ne servas por realisme prepari la progresintajn laboristojn je la provo, sed endor-

migi ilin per inventita idealismo. Eĉ la plej revolucia k plej hardigita partio povas en tiaj momentoj ofte ne tute kontraŭstari. Malgraŭ ke la cara Rusio estis nek demokratio, nek civiliganto, nek la sin defendanta flanko, proklamis la bolŝevista dumairakcio kune kun menŝevista, je ek milito, socialpatriotan deklaron kun iom da ruĝeta pacifisma internaciismo. La bolŝevista irakcio prenis baldaŭ revolucionan pozicion, sed en la jura proceso kontraŭ la irakcio malaprobis ĉiuj akuzitoj (krom Muranov) kune kun sia teoria gvidanto Kamenev la defajtisman teorion de Lenin. La neleĝa laboro de la partio preskaŭ estis mortinta en la unua tempo. Nur iom post iom aperis revoluciaj vokoj, kiuj vokis la laboristojn sub la standardon de la internaciismo, sed tute sen iuj defajtisraj devizoj. La unuaj du jaroj de la milito forigis la patriotismon de la amasoj k ŝovis la partion maldekstren. Sed la februarrevolucio kiu demokratisis Rusion, estigis novan potencon ondon de «revolucia» patriotismo. La majoreco de la pintoj de la bolŝevista partio ankaŭ ĉitiukaze ne povis kontraŭstari. Stalin k Kamenev donis en marto de 1917 al la Centra Komitato socialpatriotan direkton. Pro tio okazis en la tuta lando alproksimiĝo k en la plej multaj urboj eĉ tuta kunfandiĝo de la bolŝevistaj k menŝevistaj organizoj. Bezonigis la protestoj de la plej firmaj revoluciuloj, speciale de la progresintaj distriktoj de Petrograd, bezoniĝis la alveno de Lenin en Rusio, k lia nepacigebla batalo kontraŭ la socialpatriotismo, por ke la partio ree povis ordigi sian internacisman fronton. Tiel statis la plej bona, plej revolucia, plej hardigita partio.

72. La studado de la historio de la bolŝevismo estas netakseble grava por la eduko de la progresintaj laboristoj, ĝi montras al ili la preforton de la burĝa publika opinio, kiun ili devas divenki, k ĝi samtempe instruas al ili ne rezigni, ne perdi la kuragon malgraŭ tuteca izoligo komence de la milito.

Ne malpli zorge estas studenda la batalo de la politikaj grupiĝoj en la aliaj landoj - la militantaj k la neŭtralaj. Speciale signifaj estas la batalspertoj de Rosa Luksenburg k Karl Liebknecht en Germanio, kie la okazintaĵoj prenis alian direkton ol en Rusio, sed gvidis al la sama konsekvenco: oni devas lerni naĝi kontraŭ la fluo.

73. Oni devas zorge observi la hodiaŭ okazantan preparon de la kanonmangaĵo por la patriotismo: la diplomatajn sajnbatalojn kiuj havas la taskon, ŝovi la respondumon al la kontraŭulo, la perfidaj parolaĵoj de la malkaŝaj k sekretaj socialpatriotoj kiuj konstruas al si ponton de la pacifismo al militarismo, la vantaj devizoj de la «komunistaj» gvidantoj, kiuj jam je la unua tago de la milito ne malpli estos senkapaj kiel la germ. «kom.» gvidantoj en la punkto kiam brulis la parlamentejo.

74. Necesas observi kolekti la plej gravajn citaĵojn el la registaraj k opoziciaj artikoloj k parolaĵoj k mezuri ilin je la spertoj de la antaŭa milito, por tiel antaŭe diveni kian direkton havos la posttromo, lasi pravi tion per la faktoj k instrui al la proleta avangardo memstare orjentiĝi en la okazantaĵoj k ne surpriziĝi.

75. La plifortigo de la agitado kontraŭ imperiismo k militarismo ne eliru de abstraktaj formuloj, sed de konkretaj faktoj kiuj tuŝas la amasojn. Nece sas ne nur senmaskigi la publikan militbuĝeton sed ankaŭ ĉiujn formojn de la militarismo, kiuj estas maskitaj, neniuoj manovroj, militilliveroj, -menaĉoj ktp restu sen protestoj. Necesas per bone preparitaj laboristoj ĉiam ree starigi la problemon de la militdangero k de la batalo kontraŭ ĝi en senescepte ĉiuj proletaj organizoj k en la laborista gazetaro, postuli de la gvidantoj klarajn k konkretajn respondojn je la demando: kion fari?

76. Por gajni la konfidon de la junularo oni ne nur devas batali kontraŭ la veneniĝo de iliaj spiritoj per la socialdemokrataro k la stupida burokratismo de la 3-a internacio sed ankaŭ estigi vere internacian organizon kiu fakte apogas sin je la kritika pensado k la memstara revolucia agado de la nova generacio. Necesas aktivigi la labor. junularon kontraŭ ĉiuj specoj k formoj de ilia militismigo per la burĝa ŝtato. Samtempe oni devas ilin mobiligi k militismigi en la intereso de la revolucio (defendkomitatoj kontraŭ la faŝismo, ruĝaj bataltaĉmentoj, labor. milico, batalo por la armigo de la proletaro).

77. Por ricevi revoluciajn poziciojn en la sindikatoj k aliaj lab. amasorganizoj, oni devas nepacigeble forigi la burokratan ultimatismon,

taskoj al la ĝeneralaj, de la defendo al la atako, de la patriotaj antaŭjuĝoj al la faligo de la burĝa ŝtato. Ĉar la pinto de la sindikata, burokrataro en la plej multaj landoj en la okcidento esence estas hebliala elemento de la kapitalista polico, devas la revoluciuloj kompreni, nepacigeble kontraŭbatali ilin, kunigi la leĝan agadon kun la neleĝa, batalkuragon kun konspiracia singardemo. Nur per tiaj kombinitaj metodoj oni povas, komencante de la junularo, arigi la laboristan klason ĉirkaŭ la revolucia standardo, ebenigi al si la vojon en la kapitalistajn kazernojn k vekti ĉiujn subprematojn.

78. La kontraŭmilita batalo nur tiukaze ricevos vere larĝan, amasan, popolecan karakteron, se partoprenas je ĝi la laboristino, kamparistino la laboranta virino. La burĝa degenero de la socialdemokrataro k la burokratiigo de la tria internacio trafas plej forte la plej subprematajn k plej senrajtatajn tavolojn de la proletaro, t.e. speciale la laborantaj virinoj. Ilin vekti, konkerti ilian konfidon, montri al ili la ĝustan vojon, signifas mobiligi kontraŭ la militismo la revoluciajn pasiojn de la plej multe subpremataj partoj de la homaro. La kontraŭmilita laboro inter la virinaro devas speciale sekuri la anstataŭigon de la viroj mobiligitaj por la armeo per revoluciaj laboristinoj al kiuj en milito transiros granda parto de la partia k sindikata laboro.

79. Se ne sufiĉos la fortoj de la proletaro, eviti la militon helpe de la revolucio, - tio estas la sola rimedo per kiu oni povas eviti ĝin - tiam devas la laboristoj kune kun la tuta popolo partpreni je la milito. La anarkismaj k individuismaj devizoj, rifuzi partoprenon je la milito, deserti, ktp esence kontraŭdikcias al la metodoj de la proletara revolucio. Sed kiel en la fabriko la progresinta laboristo sentas sin kiel sklavo de la kapitalo, tiel li sentas sin en la kapitalisma armeo kiel sklavo de la imperiismo. Devigita, hodiaŭ oferi sian forton k ĉe vivon, li ne lasas forpreni de si sian revolucionan konscion. Li restas batalanto, lernas uzi armilojn, klarigas ankaŭ en la tranĉeoj la klasan karakteron de la milito, kolektas la nekontentulojn, arigas ilin al ĉeloj, disvastigas ideojn k devizojn de la partio, atente observas la ŝanĝojn en la humoro de la amasoj, la forigon de la patriota ondo la kreskon de la ribelo, por en la kriteria momento alvoki la laboristsoldatojn al subteno de la laboristoj.

LA KVARA INTERNACIO K LA MILITO.

80. Kontraŭmilita batalo premisas revolucionan batalilon, t.e. partion. Ĝi ekzistas nun nek en ŝtata, nek en tutmonda mezuro. Oni devas estigi la revolucionan partion, bazante sin sur la tuta spertaro de la estinto, inter kiuj ankaŭ la spertoj de la dua k tria internacioj. Malaprobo de la direkta k malkaŝa propagando por la 4-a internacio signifas konscia aŭ nekonscia subteno al la du ekzistantaj internacioj, de kiuj la unua aktive subtenos la militon, dum kontraŭe la alia nur povos disigi k malfortigi la proletan avangardon. (Intertempe montriĝis ke ankaŭ la "komunistoj" estas aktive pretaj subteni militon de Francio kontraŭ Germanio ktp).

81. En la vicoj de la t.n. kompartioj restos certe ne malmultaj honestaj revoluciaj laboristoj. La restemo per kiu ili sin tenas je la Tria Internacio klariĝas multkaze per revolucio kiu ne trovis la ĝustan vojon. Ilin arigi ĉirkaŭ la standardon de la nova internacio oni ne povas per kompromisoj, asimiliĝo al iliaj antaŭjuĝoj sed kontraŭe per konsekvenca senmaskigo de la ruiniga rolo de la stalinismo (burokrata partismo). Speciale akre k nepacigeble oni devas ĉe tio hodiaŭ demando pri ilia sinteno al la militproblemo.

82. Necesas samtampe atente observi la batalon en la reformista fronto. Ĝusttempe la maldekstrajn socialistajn grupojn kiuj evoluigas al revolucio envicigi en la kontraŭmilitan batalon. La plej grava kriterio por esplori la tendencojn en la koncerna organizo estas ĝia aktiva praktika sinteno al la nacia defendo k al la kolonioj, speciale tiukaze kiam la burĝaro de la koncerna lando regas pri kolonisklavoj. Nur tuta k fakta rompo kun la oficiala publika opinio en la plej grava problemo de la "patriodefendo" estas samsignifa kun la transiro aŭ minimume kun la komenco de la transiro de la burĝa pozicio al la proletara. La alproksimiĝo de tiaj maldekstraj organizoj devas esti akompanata de amikca kritiko de ĉiuj duonoj en ilia politiko k komuna prilaboro de ĉiuj teoriaj k praktikaj problemoj de la milito.

83. Ĉe la fronto de la laborista movado ankaŭ estas ne malmultaj poli;

tikistoj, kiuj ja en vortoj rekonas la ruiniĝon de la dua k tria internacioj sed samtempe opinias "hodiaŭ ankoraŭ ne estas la tempo", komenci la konstruon de la nova internacio. Tia pozicio ne estas tiu de revolucia marksisto, sed tiu de seniluziigita reformisto aŭ stupida stalinisto. La revolucia batalo ne permesas intermiton. Eble la cirkonstancoj estas hodiaŭ malfavoraj sed revoluciulo kiu ne scias naŭi kontraŭ la iluo ne estas revoluciulo. Diri ke la konstruo de nova internacio "ne konformas al la tempo" estas la samo kiel diri ke la klasbatalo k speciale la batalo kontraŭ la milito ne konformas al la tempo. La proleta politiko ne povas eviti en la nuna epoko starigi internaciecajn taskojn. La internaciecaj taskoj postulas la kunarigon de internaciaj kadroj. Ĉi tiun laboron oni ne povas malatenti eĉ nur unu tagon sen kapitulacii je la imperiismo.

34. Kiam eksplodis la milito precize aŭ en kiu stadio ĝi trafos la konstruon de la novaj partioj k de la nova internacio, tion kompreneble neniu profetos: oni devas ĉion fari por ke la preparo de la nova internacio iru pli rapide ol la preparo de la nova milito. Tamen eblas ke la militismo ankaŭ ĉi tiukaze superas la revolucion. Sed ankaŭ tia baze kiu enkludas grandajn viktimojn k detruojn ne liberigas nin de la devo, tuj komenci la konstruon de la nova internacio. La aliigo de la imperiista milito al la proleta revolucio okazos des pli rapide, ju pli multe estas progresintaj, niaj preparlaboroj, ju pli fortaj revoluciaj kadroj ekzistos jam ĉe komenco de la milito, ju pli plane ili laboras en la militantaj landoj, ju pli sekure bazas ilia laboro sur justaj strategiaj, taktikaj k organizaj principoj.

35. La imperiista milito jam ĉe la unua bato, detruos la marasman spionon de la Dua internacio k fendigos ĝiajn naciajn sekciojn. Ĝi decidas kontros la vantecon k senpovon de la Tria internacio. Sed ĝi ankaŭ ne aparas la centrismajn grupiĝojn kiu fundamentas je duoneco, evitas la problemon de la internacio, serĉas nur naĉajn radikojn, solvas neniujn problemojn tutece, malhavas perspektivon k nutras sin de la konfuziigo en la laborista klaso.

Eĉ se komence de la milito la veraj revoluciuloj nur estos ree malgranda minoreco, tiam oni tamen ne povas dubi nur minuton ke ĉi tiukaze la aliro de la amasoj al la strato de la revolucio okazos multe pli rapide, decide k senrespekto ol dum la unua imperiista milito. La nova revolucia ondo povas k devas fariĝi venka en la tuta kapitalista mondo.

Estas ĉiukaze nekontesteble, ke en nia epoko povas sufiĉe enradikiĝi en la tero de la unuopaj landoj nur tiu organizo kiu bazas sur tutmondaj principoj k estas parto de la proleta mondpartio.

BATALO KONTRAŬ LA MILITO SJGNIFAS HODIAŬ BATALO POR LA 4-A INTERNACIO!
+++++
LEO TROCKIJ:

PRI LA SEPA MONDKONGRESO
DE LA KOMUNISTA INTERNACIO.

Mi petas la legantojn de nia tutmonda gazetaro, pardoni ke mi ĝis nun malgraŭ petoj ankoraŭ ne esprimis min pri la sepa mondkongreso. Mi ne kulpas je la kaŭzoj. La debatoj de la kongreso estis unuflanke tre senformaj, intence neklaraj, aliflanke tute teatraj. Oni decidis la problemojn malantaŭ la kulisoj, ofte per telefono inter la Kremlo k la komisariĉjo per eksterlandaj aĉroĵ. En la pli malvasta cirklo eble ankaŭ ekzistis io kiel "debatoj". Sed kiam la Politoficejo estis decidinta, tiam oni nomigis la paroladantojn kiu devis referi pri la decido tiel ke la kominternpinto kiel eble plej malmulte estis kompromitata k ĉiukaze neniu dubu pri la neniam eraranta spirito de la vidanto.

Oni do devas legi la raportojn pri la diskutoj kiel diplomatiajn dokumentojn, do oni ĉe ĉiu vorto demandu sin: kion la paroladanto envere volas? kion li prisilentas? kaj kial? Dum diplomatiuj dokumentoj estas ĝenerale mallongtekstaj, estas la kongresraportoj kontraŭe nekutime longaj. La laciga amplekso de la raportoj estas helpfaroj de la burkhrata memasekuro: oni ja devas fari laŭeble multajn k malĝustajn asertojn sen respekto al ilia sinkontraŭdiro - oni ja ne scias kiu de decidoj validos estonte. Al tio oni devas kalkuli la sufiĉe malbonajn referaĵojn en la gazetaro. La referaĵo povas esti klara, bona, konvinka nur tie, kie okazas malkaŝa batalo de la ideoj, kiu ja ĉiam helpas al la precizigo de la diritaĵo, sed tie kie la oficisto-paroladanto forviŝas siajn proprajn postsignojn k tiujn de siaj ĉefoj, k kie la ĵurnalisto-oficisto referas la konfuŝan paroladon daŭre timante ke li nun ofendas, tie estas la gazetraportoj nur hontiga kunaĵo de senrilataj diraĵoj. Tiaspecaj estas la raportoj en la "Humanitè" kun kiu mi ĝis nun devis kontentigi min. Kiam mi ekz. provis, baze de ĉi tiuj

raporto proksimume prezenti al mi kio estas sub la kondiĉoj de la hodiaŭa krizo la japania laborista movado k kian situon havas en ĝi la japania kompartio, mi eksciis precize nur ke amego je la gvidanto estas japanlingve esprimata per la vorto „bancaj“, sed tion mi jam antaŭe sciis ĉar „bancaj“ ankaŭ estas kriata honore al la mikado. Cetera brilis Stalin je la kongreso per silentado, simile kiel la mikado. La t. nudiskutoj temis pri du problemoj - la „unuecfronto“ politiko (alia politiko ŝajne hodiaŭ ne plu ekzistas) kontraŭ la faŝismo k la sama politiko kontraŭ la milito. La paroladoj de la referantoj - la vulgara k stupida raporto de Dimitrov k la jezuitaj artifikoj de Er- koli - aldonis nenion novan al la skribaĵoj de la kominterngvidanto, kiuj abundis en la lastaj monatoj, speciale en Francio. La spertoj de la franca kompartio staris en la fokuso de la intereso, k estis rekomdataj kiel utiligindaj. Sed ĝuste la fundamentaj problemoj de la kongreso jam de post longa tempo estas pritraktitaj de la organizoj de la 4-a internacio. Rilate al la moskvaj debatoj ni revoluciaj marks- istoj ne bezonas ŝanĝi nur unu linion de tio kion ni ĝis nun diris pri la problemoj de la milito, faŝismo, „unuecfronto“ k „popolfronto“. Per tio mi tute ne volas diri ke ni lasu la 7-an mondkongreson neat- tite. Tute ne! Estas egale ĉu la debatoj estis enhavriĉaj aŭ vanaj - ĉiukaze ili reprezentas etapon en la movado de certa parto de la lab. klaso. Ĝi jam per tio gravas ke ĝi legaligis la oportunisman kursŝan- ĝon en Francio k ampleksigis ilin tutmonden. La kuriozo de la burok- rata pensado montriĝas jene: dum la kongreso unuflanke, minimume sur la papero, donas al ĉiuj sekcioj liberalan aŭtonomion, k eĉ ordonas al ili pensi memstare k asimiligi sin al la naciaj kondiĉoj, ĝi tamen opinias ke por ĉiuj landoj de la mondo, la faŝista Germanio k la „demokrateca“ Norvegio, Britio k Hindio, Grekio k Ĉinio, necesas la „popolfronto“ k se- eble, popolfrontregistaro. La kongreso estas grava pro tio ke ĝi post periodo de la ŝanceliĝado, decide signas la eniron de la Kominterno en la „kvaran periodon“, kies devizo estas: „Daladier al la potenco!“, kies ilago estas la Trioloro, k kies himno estas la Marseljezo, dum la „In- ternacio“ nur aŭdiĝas de malproksime...

Por povi prijuĝi la profundon de la kursŝanĝo de la Kominterno k ĝian konkretan enhavon rilate al la kondiĉoj en la diversaj landoj, devus ĉiukaze la rezolucioj doni pli ol la debatoj. Sed eĉ ne pri unu sola de la preparolitaj problemoj oni antaŭe publikigis projektojn de rez- olucioj. La diskutoj ne temis pri certaj tekstoj, sed disfluis en la nefinon... Nur poat kiam ĉiuj paroladintoj estis finintaj sian laŭ- kriadon je la gvidanto, k komencis paki siajn valizojn, iris speciala komisiono al la laboro, verki la rezoluciojn. Senekzempla fakto: la ofi- ciala kongreso fermiĝis sen esti akceptinta iun rezolucion! Por tio zorgu la novaj gvidantoj, jam elnomitaj de la kongreso (Dimitrov), laŭ- eble kun respekto al la deziroj k humoroj de la dehegitoj... Tiamani- ere malfaciligis la meĥaniko, propra al ĉi tiu kongreso, ĉian ĝusttempa kritikan pritrakton de siaj laboroj en plej alta grado. Sed nun estas publikigitaj la ĉefaj materialoj de la kongreso k tiel nun eblas fari teorion k politikan bilancon.

Estus ĉe nia flanko grava eraro, opinii ke la teorio k praktiko de la „3-a periodo“ nun decide k sendolore estas likviditaj per la „memkri- tiko“ de la gvidantoj, k ke la oportunisma k patriota kursŝanĝo havas sennuban estonton. Se ankaŭ la burokrataro tiel facilanime brulis ĉion kion ĝi antaŭe alpreĝis, ĉe la amaso estas la afero alia. Ili pli sin- cere k serioze kredas je la malhavaj devizoj. En la konscio de la lab- oristoj sekvantaj al la Kominterno pluvivas la spirito de la „tria periodo“ (1928-34). Ekzemple ĉi tiu spirito ribeligis la francajn kom- unistojn de Brest k Toulon (kiujn „komunista“ k soc. dem. partio tiel perfide priinsultis en siaj gazetoj. Red.) Provizore sukcesas al la gvi- dantoj, trankviligi la reziston en la bazo, per mensogaj asertoj, laŭ- kiuj Kominterno nun faras sagacan manovron, trompi la radikalulojn k socialdemokratojn, sed poste ni montros tion al ili!“. Aliflanke havi- gas la popolfrontisma k patriotisma kursŝanĝo de la Kominterno al ĝi la simpatio de novaj tavoloj, kiuj staras malproksime de la laborista klaso, estas patriotoj k nekontentaj kun la francaj financegoj, ili- gandas en la kompartio nur la plej energian alon de la popolfronto, ĉio signifas, ke en la kompartio k ĉiukaze ĝi akumuliĝas kontradikciaj tendencoj, kiuj devas gvidi al unu aŭ pluraj eksplodoj. Por la organi- goj de la Kvara internacio sakvas el tio la devo, plej atente observi la internan vivon de la kompartio, subteni la revolucionan proletan ten- dencon kontraŭ la gvidanta socialpatriota, kiu de post nun pli k pli- gveniĝas en provoj de kulaboro inter la klasoj.

Ĉi tiu dua konsekvenco rilatas al la centrismaj tendencoj k ilia sinteno al la strategia kursŝanĝo de la Kominterno. Neeviteble sentos sin la- kstre centrismaj elementoj altirataj de ĉi tiu kursŝanĝo kiel de magneto. Necesas nur montri al la milititacoj de Otto Bauer, Zyromski k

la rusa menŝevisto Dan, por ke tute klariĝu: ĝuste ĉi tiuj reprezentantoj de la "nora mezo" esprimas multe pli bone ol Dimitrov kaj Ercoli la veran esencon de la nova kominterpolitiko. Sed ne nur ili. La magnetka ampo kompleksas pli maldekstren. La "Neue Front", organo de la Socialista laborista partio (plej tipa repr. de la maldekstra centrismo, germana partio. Red.) salutas en siaj lastaj du numeroj (17 kaj 16) kaŝate sub aro da singardemaj rezervoj, la oportunisman kursaŝanĝon de la Kominternio kiel liberigon el sektisma ŝtoniĝo k transiro al pli "realisma" politiko. Tio sufiĉe bone ilustras ke estas sensencaĵo la parolado, ke la SAP principe konsentas kun nia politiko, nur malaprobas niajn "metodojn". Envere montras ĉiu granda problemo ha nekongruon de niaj principoj. La proksimiĝanta militaŝanĝo surprize devigis la SAP-on, proklami la senmoraligan devizon pri la "senarmigo", kontraŭe al ĉi. Eĉ Baucr, Zyromski kaj Dan malaprobas hodiaŭ la senarmigdevizon kiel "ne-realan". La sama kontraŭo de la principoj rezultis ankaŭ en la prijuĝo de la evoluo de la Kominternio. Dum la plej granda konjunkturo de "tritia periodo" ni tre bone antaŭvidis ke la paroksismo de la ultra-maldekstrismo gvidas al nova oportunisma zigzago kiu fariĝos ankoraŭ pli profunda kaj ruiniga ol ĉiuj antaŭaj. Kiam la Kominternio ankoraŭ evoluis en la fajro de la "revolucia defajtismo", ni jam profetiis ke la teorio pri la "socialismo en unu lando" necviteble havas social-patriotajn konsekvencojn kun ĉiuj siaj perfidaj sekvoj. La sepa kominternkongreso donis surprizigan pravigon de niaj marksistaj prognozoj. Kion nun? La SAP-gvidantoj kiu ĉi nun forĝosis kiel ĉi ĉi lernis salutas la novan, plej kriterian stadion de nesaniĝebla malsano, en kiu ili vidas simptomojn de "realisma" saniĝo. Ĉu ankoraŭ ne estas klare ke ĉi tie temas pri du nekongruablaj pozicioj?

De la donita vidpunkto estas tre interese, kiel la maldekstre centrista partio reagis je la sepa mondkongreso, kiu ĉi nun staris plej proksime al la Kominternio, nome la ILP de Britio. Ĉu ĉi altiriĝos de la malprofunda "realismo" de la sepa kongreso aŭ ĉu ĉi kontraŭe estas forpuŝota de ĉi maliruvigita kaj ruiniga oportunismo? De ĉi tiu alternativo dependas la plua sorto de la ILP.

Ĝenerale oni povas diri, kiaj ajn estu la unuopaj etapoj kaj epizodoj, la kursaŝanĝo de la Kominternio iksista de la kongreso plisimpligas la situon en la laborista movado. Ĝi solidigas la socialpatriotajn frontojn, alproksimigante sendepende de la stato de la "organa unueco", la partiojn de la 2-a kaj 3-a internacioj. Ĝi plifortigas la centrifugajn fortojn de la centristaj tendencoj. Des pli grandajn eblojn ĉi donas al la revoluciaj internaciistoj, t.e. al la konstruantoj de la 4-a internacio.

7-9-35

L. Trocki

+++++
TRA LA GAZETARO ESPERANTISTA.

LA LABORISTA ESPERANTISTO raportas ke SATEL nun en aprilo havas jam konferencon. Saluton! - INTERNACIA LINGVO, la organo de la poliaj lab. esp. havas ĉefe pollingvan tekston. Ĝojige estas la jeno: (la polia lab. esp. as.) kiel klasbatala societo laborista pro principaj konsideroj rifuzas partoprenon en la kongreso (oni opinias la burĝan "universalan" kongreson en Varsovio 1937) opiniante cetero ke en realaj cirkonstancoj de ĉi tiu kongreso la partopreno de laboristaj rondoj estus necbla kaj sencela. Ni salutas ĉi tiun decidon. Bedaŭre ne ĉiuj lab. esp. estas tiel klaskonsciaj - la jugoslaviaj ekz. regulas partoprenas en burĝaj kongresoj. - LA LABORISTO estas organo de la anarkistaj esperantistoj. Ĝi en marto aperis je la unua fojo presite. Estas interese ke en raporto pri Hispanio ili nenion skribas pri tio ke iliaj hispaniaj kamaradoj rompis la kontraŭparlamentan tradicion kaj formis la Sindikalistan partion, kiu tre similas kaj tendencas al niaj organizoj. Simila evoluo okazis kiel konate jam antaŭ pli longa tempo en Nederlando. Nia ticia sindikato (NAS) konsistas plejparte el iamaj sindikalistoj kaj anarkistoj, nun ĉi staras sur la fundamento de la 4-a internacio. (Kiam Lenin iondis la 3-an internacion okazis simila afero).

BULGARA ESPERANTISTO raportas ke la sociaj esperantistoj sukcesis kunigi la mondan necsan por havigi al si propran hejmon, plue ni legis raportojn pri bulgara esp. kongreso. - En INFORMULO DE LA ESP. AS. DE ESTONIO oni ne malalte legas artikolojn kiu estas direktataj kontraŭ UEA. Estas ja konate ke granda aro de burĝaj asocioj kaj gazetoj estas nekontentaj kun la sinteno de la "Universal" (!) Esperantoasoc. - NIA GAZETO enhavis plurfoje stultajn menciojn direktitajn kontraŭ ni resp. niaj kamaradoj, ni ne intencas respondi al tiaj stultajoj, cetero ni el la dua leterkasta mencio direktita al ni, klare nur komprenis (ĉar la resto estas nekomprenbla) ke la red. de "Nia gazeto" ne estas troŝarĝita per inteligenteco, ĉar ĉi komprenis nur la duonon - kaj eĉ ĉi malĝuste - de manuskripto kiun k de S. sendis al ĉi. - VERDA REVUO estas tre anuza gazeto. En unu el la lastaj gazetoj oni ekz. legas pri

"spirita mobilizo kontraŭ milittrenezon (je la kioma fajo jam?), sed pagojn poste oni legas icmete pri la veraj kaŭzoj de la militoj, la kapitalismo, en la art. "La batalo pri la mondpotenco cleo". Jes, komsekvence ne estas la plej forta flanko de la burĝoj.

LA PROGRAMO DE LA SVEDIA SOCIALISTA PARTIO (KILBOM KOMUNISTOJ).

La svedia socialista partio faras surface tre stabilan impreson. Ĝi havas naŭ deputatojn en la parlamento, fortan partioorganizaĵon, konsiderindan taggazeton, 2 semajngazetojn en la provinco, junulascion kun 7 000 - 8 000 membroj, kun propra ducmonata gazeto, ĉiuj tre rekomendindaj kiel alcelindaj aferoj. La problemo estas nur, kun kiu spirito estas ĉi tiuj aferoj plenigitaj, je kiu programo bazas la partio.

Unue ion pri ĝia historio. Ĝi elskismis sin el la komunista partio tuj post la komenco de ties ultramaldekstra periodo (1929), farigis sekcio de la brandlerisma IVKO, de estis dekstra KP-epozicio, tiam ĝi kunfandiĝis kun la maldekstra SP-epozicio (Ström), k nun nomis sin "Soc. partio", besis la rilatojn al la brandlerista centro k aliĝis al la SAP-internacio, la london-amsterdama oficejo. Ĝia politiko estas tipe centrista nun.

Ni havas antaŭ ni kelkajn oficialajn dokumentojn, nome 1-e la principdeklaron akceptitan je la unuiĝo de la Kilbompartio kun la Ström-grupo meze de apr. de 1934 (lat. Folkets Dagblad 17-4-34), 2-e la tiam same akceptitan agadprogramon (16-4-34, Folkets Dagbl.), 3-e la politika agadprogramon akceptitan je la kunveno de la Centra Komitato paskon de 1935.

La, ne nur la amplekso, tre malgrasa principdeklaro plenumas eĉ ne la plej malgrandajn dezirojn kiujn oni devas havi pri tia dokumento, speciale se gvidartikolo akompananta la dokumenton, kuragas aserti, la unuigkonferenco baziĝis sur la "fundamenta vivanta kiel forta teorio de la marksismo-leninismo". Ni unue pritraktu la plej gravan problemon - kiel staras la partio al la problemo de la aliigo de la kapitalista socio, ĉu ĝi estas por la perforta revolucio, la armita ribelo, la proletara diktatoreco, la sovetregimo? La "principdeklaro" ne respondas je tio.

Certe oni trovas en kelkaj malmultaj frazoj honteman aludon je la oktobra revolucio: "La rusiaj bolŝevistoj povis venki pro tio, ke ili komprenis gajni la amasojn per sia partio kiel ties batalo. Laboristoj, kamparistoj kiel soldatoj kolektis sin ĉirkaŭ la partio. Tio okazis ĉar la partio pro ĝusta prijuĝo de la situo proklamis la "tagpostulojn" (!!) kondiĉitajn de ĉi tiu situo. La venko de la rusia revolucio montras la forton de la principo, ke la liberigo de la labor. klaso devas esti ĝia propra verko."

Ĉi tiun vojon kiuj iris la laboranta popolo de Rusio en 1917 - tiun vojon ankaŭ devas iri la labor. amasoj de Svedio, se ili volas eliri la krizon."

Tio estas ĉio kion ili diras pri la instrukcio de la rusia revolucio kiel la problemoj de la konkero de la potenco. Oni eĉ ne faras la proponon iel konkretigi la instrukciojn de la rusia revol., se oni malatentas la filistron aludon je la "ĝustaj tagpostuloj". (Ĉu eble la devizo "La tutan potencon al la sovetoj" estis nur tagpostulo? Ĝe jes, tiukaze unu de tia tago en kiu - kiel Marks skribis en letero al Engels - estas enhavataj 20 jarcj.) Ne, se la partiprogramo diras nenion vorton pri la oksterparlamenta batalo, pri la amasstriko, la armado de la laboristoj, la kunligo de la ĝustaj kun neĝustaj metodoj, la signifo de la sovetoj, la neceso detruo la malkoran ŝtataparaton burĝan, la senrekompencekspropriigo de la ekspropriigintoj, tiam perdas la aludo je la oktobra revolucio ĉian enhaven. Jes, ĝi eĉ ricevas trompan karakteron, ĉar en la nomita agadprogramo estas la vojo al la potenco pentrata per la jenaj idilaj koleroj: "Per kunlaboro kiel post ion plifortiĝanta alianco de la laboristoj, malgrandaj kiel mezaj kamparistoj kiel la malsupraj tavoloj de la meza klaso ĉirkaŭ la socialista tagpolitiko likvidiĝos la kapitalista anarkio en la politika kiel en la ekonomia kampoj."

Ankaŭ tio estas ĉio kio en la politika agadprogramo estas dirata pri la vojo al la potenco, tiel ke la agadprogramo estas ĉio, nur ne konkretigo de la principdeklaro. Kontraste, eĉ la hontema aludo je la neceso de la revolucio estas eliminata kiel oni malfermas al beformismaj iluzoj ĉiujn pordejn.

De rezultas ke oni laŭeble vualigas la problemon de la revolucio en la nacia mezuro en la programaj dokumentoj, sed pri iuj internaciaj problemoj, la internacia karaktero de la revolucio kiel la internacia organizigo de la tutmonda proletaro la sveda partio ŝajne havas tutneman intereson. Certe oni en po unu subfrazo malaprobas la 2-an kiel trian internacion, sed kiel internacion programon la sveda partio a

robas, tion oni ne ekscias. La IIP, la hisp. partio de la marksista unueco, la germ. SAP - ĉiuj grandaj centristaj organizoj havas pozicion rilate al la problemoj de la internacio. Certe tiaj pozicioj inter si diferencas k ili ne estas leninistaj. Kontraŭ la svedia partio eĉ ne opinias ke estas necese malŝanĝi nur unu lignon de siaj programaj dokumentoj por internaciaj problemoj, tial ekz. partoprenas la partio de la konferencoj de la london-amsterdama oficejo sen havi ian polit. pozicion. Ĝi tial ankaŭ sentas sin plej multo alirata de la komfortaj "hericjoj" de la SAP, kiu transdonas la solvon de ĉiuj problemoj al la "historia procezo". Sed eĉ la partopreno je tiaj konferencoj ne trovis ian ekan en la oficialaj programaj dokumentoj. Kompreneble havas la Soc. partio de Svedio la plenan subjektivan liberon sin decidi por aŭ kontraŭ la 4-a internacio, sed ĝi ne havas la rajton rigardi la problemon de la proleta internacio kiel ne ekzistantan.

Ziel, neprogresinta la svedia partio estas en tutmondaj problemoj, jam rezultas ankaŭ el tio ke ĝi en sia agadprogramo, akceptita en somero de 1935, kulpigas la komunistojn pro ultramaldekstra k sektisma politiko. Se oni eĉ ne povas postbli ke la svedaj partigvidantoj komprenas la signifon de la popolfrentpolitiko (kiu jam komencis fine de 1934!!!) tiam oni devas minimume postuli ke ili komprenas kion signifas la komuna deklaro de Stalin k Laval de majo de 1935 kiu transdonis la francian proletaron al la franca imperiismo. La dumjara stupida batalo de la brandleristoj kontraŭ la ultramaldekstrismo gvidas ĉi tie al nura domquijotismo, kiu ankoraŭ batalas kontraŭ ultramaldekstra politiko, kiam ĉi tiu jam depost longe fariĝis al ultraoportunismo. Ankaŭ pri la danĝero de la nova mondmilito k la taskoj de la labor. movado rilate al ĝi ne estas la parolo en la programaj dokumentoj de la svedia partio. Certe aperas en la Principdeklaro la retorika banalajo: "Samtempe kreskas la militdanĝero pro la batalo de la kapitalistaj potencgrupoj pro la novpartigo de la mondo", sed tio estas ĉio kio estas dirata pri la problemoj de la milito. Tial ankaŭ la partio ne estis armita okaze de la konflikto itala-abisenaj. Ĝi (gratulinde) decidis sin kontraŭ la Ligo de Nacioj k ties sankcipolitiko, sed en la partigazetaro oni povis legi artikolojn de iuj kduj faris la kontraŭon k (erare) postulis liveron de armiloj al abisenio. K post forigo de ĉi tiu eraro komencis la partio kampanjon por la devizoj: "paco k senarmigo", kun vendo de paciasignoj ktp, kiuj sufiĉe evidentigis la la etburĝe-pacifisman karakteron de la partio.

Ni nur limigas nin ĉi tie al kritiko de la plej gravaj punktoj de la programaj skribaĵoj de la partio. Per tio ni ne volas impresigi, ke la cetero povas kontraŭstari al marksista kritiko. El la dirito ĉiukaze sufiĉe evidentigis ke la ĉajne tiel solida organizo de la svedia soc. partio estas konstruita sur tre nesolida programa fundamento. Pri la plej gravaj problemoj oni aŭ diras tute nenion aŭ superpentras la problemojn per multesignifaj frazoj. La ĉajna stabilo de la partio ĉi nur estas reflekso de la stabilo de la burĝa demokrateco en Svedio kiu siaflanke nur estas reflekso de la svedia ekonomia konjunkturo, kiu bazas sur la tutmonda militpreparo. La problemoj de la klasbatalo ankoraŭ ne montriĝis en sia tuta akreco, tial la social. partio devas malatenti ilin. Kiam Svedio entiriĝos en la krizon, tiam montriĝos la stabileco de la soc. partio k de la burĝa demokrateco en Svedio kiel fantomo. Jam hodiaŭ ekzistas la kontraĵoj en la partio embria. Ekz. estas esperige ke la redaktisto de la junula gazeto (Avantgardet) Ole Kellerman, je la 20-a de nov. nomas la plej novajn dfendantojn de la "skandinavia demokrateco", la stalinistajn junul-rgvidantojn, r e s e g a t o j n k memorigas ilin je la devizo: "la kontraŭulo staras en la propra lando." Ankaŭ en diversaj artikoloj de la kunredaktisto de "Folkets Dagblad" Nils Flyg, oni trovas kelkfoje malfortajn komentojn demarksista-leninista pozicio. Ju pli frue kunigas sin la evolugablaj elementoj de la partio, studas la programajn dokumentojn de la 4-a internacio k sur ĉi tiu bazo gvidas en la partio konsekvenca batalon por siaj opinioj, des pli multe oni povas esperi, ke sukcesos al ili gvidi la ŝipeton de la svedia socialista partio tra la venonta periodo de sufiĉe fortaj ŝtormoj de internaciaj militoj k klasbataloj.

W.H.

LA STALINISTA PERFIDO PRUVITA PER LA LECTURO DE LA "HUMANITE"

Sekvante ni donas kelkajn citaĵojn el la centra organo de la franca "komunista" partio, L'HUMANITE. Ni kontraŭas ilin al la sesa el la t. z. 27 kondiĉoj kiuj estas akceptitaj de la dua mondkongreso de la Kominternacio, kiuj estas tiam ankoraŭ marksista-leninista, en 1920.

En ĝia teksto: "Ĉiu partio kiu deziras aparteni al la tuta internacio devas havi la devonon nur la malĉesna socialpatriotismen, sed ĉiukaze

la hipokritan socialpacifismon senmaskigi, necesas sisteme montri al la laboristoj, ke sen revolucia faligo de la kapitalismo neniu internacia juĝejo, neniu debato pri armlimigoj, neniu demokrateca reorganizado de la Ligo de nacioj povas ŝirmi la homaron je la imperiistaj militoj.

ĈU EKZISTAS DU DIVERSAJ IMPERIISMOJ? Peri skribis en Humanite la 11-4-35:

Necesas kompreni, ĉu la potencoj kiuj ne havas intereson militi, povas sekurigi la pacon, decidante sin al reciproka helpo, aŭ ĉu ili kaŝitlaciis je la planoj de Adolf Hitler pri nova dispecigo de Eŭropo. LA POLITIKO DE LA KOMINTERNO. De Peri en la "Humanite" de la 16-4-35:

Kiu estas sub ĉi tiuj kondiĉoj en la kadro de la nuna sistemo la sola recepto kiu povas malfaciligi militajn faradojn? La plej bona recepto estas certe la ĝenerala senarmigo aŭ limigo de la armado kiun Sovetio proponis k defendis, dum ĉiuj aliaj potencoj batalis kontraŭ tio. Danke de la ĝenerala armlimigo, je kiu tute ne volas rezigni Sovetio, opinias la registaro de Sovetio k kun ĝi la proletoj en ĉiuj landoj ke la plej bona metodo eviti la militon estas, tiu de la paktoj (!) per kiuj sin devigas la ŝtatoj bojkoti la atakantojn.

LA KOMINTERNO FARAS PROPOŬOJN AL LA IMPERIISTOJ. Artikolo en la "Humanite" je la 2-4-35.

"Sed kion opinias la registaro de la nacia unuiĝo en Francio pri ĉi tiu opinio de la registaro de la nacia unuiĝo en Britio? Ĝam ne plu estas sekreta ĉe Laval ion simpatias kun la proponoj de Hitler. Ĉu li kredas ke interkompreniĝo de la faŝistoj kun la franca imperiismo kontraŭ Sovetio plibonigas la situon de la fr. imperiismo? Ĉu li

ke la amasa movado kontraŭ la milito k por la defendo de la germasoj/sovetoj en Francio havas tute alian forton ol en Britio? Ĉu li jam ne plu memoras pri la proksima estinto kiam la registaro de la franca imp. ne plu povis bridi la amasan movado de la laboristoj k soldatoj favore al la diktatoreco de la proletaro, k tial, por eviti tion, plej rapide ĉesis la militon kontraŭ Sovetio?

Ĉu estas en la nomo de la franca-britia alianco, k s-ro Pierre Laval devis uzi tiajn krimajn senkulpigadojn, kiujn ni jam tiel ofte senmaskigis...

Ĉi ĉi tiu montras ke ankaŭ s-ro Pierre Laval entombigis la orientpaktan k la reciprokan helpon. La ekstera ministro evidente rezignis je la sola formulo de la sekuro (!) kiu povas rezervi la pacon k halti la kreskon de la armado. Lia bedaŭrinda sinteno jam havigis al li la gratulojn de la "Völkischer Beobachter". Sed ĝi mabiligos kontraŭ li la justan kleron de ĉiuj kiuj deziras pacon."

PERI K PERTINAX. Blum diskutas en la Populaire de la 21-4-35 kontraŭ Pertinax de la Echo de Paris, kiun li nomas mallerta amiko de Sovetio, ĉar ĉi tiu kiel realista burĝo vidas la problemon de la alianco kun Sovetio nur sub la vidpunkto de la fortpropecoj. Li nur rigardas la "francajn" interesojn, se li ankaŭ rigardus la "rusajn", li certe skribus kiel Peri, la vera amiko de Sovetio je la 4-4-35 en la Humanite:

"Aliaj asertas ke s-ro Pierre Laval, same kiel Sir John Simon, simple volis anstataŭigi la orientpaktan per aviadilkonvencio, al kiu povos aliĝi la subskribintoj de la Locarnopakto, Sovetio k la etentencoj. Oni tute rakontas esti ricevinta la konsenton de Germanio k Polio por ĉi tiu sistemo.

Ĉu, ni ne hezitas skribi, ke ĉi tiu sistemo ne havas ajnan rilaton kun la paco....

La atakanto ne senkuragiĝos, se la sola risko kiun li havas, estas tiu ke la aliaj ŝtatoj ne helpas al li aktive. La senintereso jam estas malfacile per aventuroj.

La konkreta kazo kiu interesas nin signifas la Laval-a sistemo nur ĉar ke Germanio povas realigi siajn planojn en la oriento, ke Francio helpas aktive al ĝi sed, ke ĝi ankaŭ ne faros ion kontraŭ tio."

ĈU PERFIDAS SIAN PATRION? Ĉar laŭ Thorez de post Julio de 1934 la komunistoj amas sian patrion, estas tiuj kiuj ne amas sian patrion evidente la burĝoj, tiel skribis Cachin je la 10-4-35:

"Ni senmaskigos la ekspluantojn de la patrio, la abomenindajn konsolulojn de la franca popolo...."

Evidente oni ankoraŭ ne komprenis la veran patrioton Cachin, tial li diskutas kontraŭ la faŝisto Waittinger jene:

"La faŝisto T. rajtas senpune disvastigi militismajn k ofic. diplomatiujn informojn, kiujn li ricevis en la parlamentaj komisionoj. Tiumaniere li povas liveri al Hitler argumentojn por novaj armigoj,...

«patrioto», kiu tiel perfidas la patrion devas esti subpremata de la kontraŭfaŝistoj.»

Vaillant-Couturier komencas en la Humanite de la 13-4-35 sanktan militon «Helpu al la franca kulturo!

«La proletoj reprenu la vorton de Marx:» ni ne havas patrion, sed ili atentu ke ili kiel internaciistoj tamen(?) havas ion por defendi - nome la kulturan heredaĵon de Francio, la spiritajn riĉaĵojn...»

KOMINTERNO MALKAŜE ANONCAS SIAN PERFIDON. Tiele ĉi indikas la taskojn de la proletoj dum milito en la alvoko de la etapaj kompartioj de la 18-4.

Ni salutas ĉiujn progresojn kiujn faris la sola patrio de la laboristoj rilate al la militisma kapablo, ĉiujn progresojn kiuj servas al la plifortigo de la Ruĝa Armeo, de la laboristoj k kamparistoj, kiu garantias la paco, ĉiujn ilifortigojn de la limoj de la socialista patrio - ni ekzakte de kontraŭrevolucia milito kontraŭ la socialista patrio subtenas la Ruĝan armeon de Sovetio per ĉiuj rimedoj k bataloj por la malvenko de la germana imperiismo k por la malvenko de ĉiuj potencoj kiuj militas kontraŭ Sovetio...»

(Do ne plu estas ĉeftasko por la proletaro, batali por la malvenko de sia PROPRA burĝaro, sed...» por la malvenko de la germ. imperiismo...» Tio signifas paco inter la franca proletaro k burĝaro dum milito - «sanktan union!»)

SENNAĈIISMO Aŭ MARKSISMO? ĈU «RUĜA FAŜISMO» EN SOVETIO?

De homoj kiuj komprenas nenion de politiko sin ekupas pri Sovetio, ili kutime venas al la bezulto ke en Sovetio regas «ŝtatkapitalismo», «ruĝa faŝismo», «ruĝa imperiismo» a.s. La kaŭzo estas ke ĉi tiuj «teoriuloj» kutime «forĝesas», ankaŭ pritrakti la klasan bazon de Sovetio kiuj ja estas la esenca afero.

K-ĉe Lanti. tiu ultramaldekstrulo k idealisto, reprezentas depost la junio de 1935 la «teorion» pri ekzisto de iu «ruĝa faŝismo» en Sovetio. Komprenable li tute nenion scias pri la esenco de la faŝismo, nek pri la klasa karaktero de Sovetio, sed tio ne malhelpas lin rakonti al la miranta popolo, «ne longe certumante pri tiu akcesora(!) demando» (laŭ Herezulo 5) ke la stalina registemo estas speco de faŝismo, «ĉar» la 3 faŝismoj (nigra, ruĝa, bruna) havas la jenajn trajtojn «komune»: «unu sola partio kun unu sola estro, absolutisme komandanta, ĉiu parolo k kunvenlibero estas nuligita, la gazetaro estas cenzurata, la kontraŭuloj de la sistemo estas malliberigataj aŭ ekzekutataj, la militismo estas senbrido, freneze glorata ktp ktp ktp ĉio tre bone, Lanti forĝis nur unu aferon - nome la klasan karakteron.

Lanti ne klopĉis, ĉoni bildon pri la esenco de ĉia faŝismo k pri la esenco de Sovetio - tion ni nun velas fari por li.

KIO ESTAS FAŜISMO?

Rigardante la tipajn formojn de la faŝismo, ĉi ricevas la jenan rezulton:

- a. entric de la faŝismo estas regule ekklasigitaj elementoj kun burĝa resp. etburĝa ideologio: iamaj oficiroj (k.p. la germanajn «Freikorps») intelektuloj, senlaboraj filoj de etburĝoj (Italio), neniam laboristoj.
- b. kondiĉoj por la kresko de la faŝismo estas nekapable de la revolucia partio, ligi la etburĝaron al la proletaro, montrante al la etburĝoj la revolucion elirvojon el la krizo, akra krizo kiu ruinigas la etburĝojn, kiuj pro la malgusta politiko de la revlpartio ne trovas la vojon al sia natura alianco, la proletaro.
- c. kondiĉoj por la ekkonkero de la potenco flanke de la f. estas: la etburĝaro estas sufiĉe granda parto de la popolo, la revol. partio malgraŭ sia malgusta politiko estas ĉiutage pli danĝera minaco por la regado de la finackapitalo.

Faŝismo de premisas kapitalisman sistemon en la formo de la imperiismo (regado de la finackapitalo), ukran krizon kiu ruinigas la etburĝaron, sufiĉe granda tavolo de etburĝoj, la etburĝoj estas la amasa bazo de la faŝismo, la revolucia partio fanas malgustan politikon, tiel ne povas ligi la etburĝojn al la proletaro. La amasa bazo de la faŝismo ĉi estas la etburĝaro. La etburĝaro povas hiekk mortanta klaso (la kapitalismo efikas akumuligon k koncentrigon de la kapitalo) k kiel interklasoj inter proletaro k burĝaro (t.s. ke la etburĝoj fandiĝas iom post iom al proletoj aŭ kapitalistoj) ne fari nemstaran politikon, la politiko estos ĉiam nemstara, la etburĝoj nur politikumas serve al la proletaro - aŭ al la finackapitalo.

La bolŝevistoj en Rusio faris 1917 ĝustan agrarpolitikon. Tial la ruĝaj kamparistoj aniĝis al la bolŝevismo. Kontraŭe faris la kom. partio de Germanio en la lastaj jaroj malĝustan politikon. Tial aniĝis la Germaniaj kamparistoj ne al la kompartio sed al la faŝista Hitler-partio.

La etburĝa karaktero kompreneble ankaŭ montriĝas en ĝia ideologio. Antisemitismo estas ja nur konata ĉe la germ. faŝistoj, sed tio kaŭzas je la speciala situo de la germ. judoj. La "socialismo" de la faŝistoj estas tipa etburĝa "socialismo", ili ne intencas nuligi la privatposedon je la produktiloj, ili nur "kontraŭbatalas" la grandajn trustojn k postulas cetere preferigon de la malgrandaj entreprenoj, ktp. Se tia "socialismo" fakte estus realigebla, ĝi estus reakcia k ni devus kontraŭbatali ĝin, ĉar preferigo de la malgrandaj entreprenoj signifas forigo de la grandaj entreprenoj k per tio malfaciligon de la konstruo de la socialismo, ĉar la socialismo nur estas konstruebla baze de grandega industrio.

Sed la nomitaj postuloj fakte estas tute ne realigeblaj, ĉar ili estas la postuloj de mortanta klaso. La historia evoluo iras la kontraŭan vojon - la leĝoj de la kapitalismo tendencas al forigo de la malgrandaj k fortigo de la grandaj entreprenoj. Ju pli la historio antaŭeniras, des pli kolektiĝas (sub la kapitalismo) riĉo je la unua flanko, malriĉo je la alia flanko de la hodiaŭa socio. Oni ne povas returnigi la historian evolucion. Provas oni tian tamen, fariĝas tia provo nepre reakcia, ĉar oni tiel semas danĝerajn iluziojn.

Ankaŭ en aliaj punktoj oni povas montri la etburĝan karakteron de la faŝistaj programoj. Sed tian ni ne povas ĉi tie pro manko de spaco.

LA KLASA KARAKTERO DE SOVETIO

Por apliki la difinon de la faŝismo al Sovetio, oni antaŭe devas esplori la klasan karakteron de Sovetio. Por tio necesas koni la ekonomian strukturon.

Lenin indikis en 1918 por Sovetio la jenajn 5 ekonomiajn formojn:

1. la patriarĥa kamparista ekonomio (grandparte natura mastrumado), 2. la "malgranda varproduktado", 3. privatkapitalismo, 4. ŝtatkapitalismo, 5. socialismo. Ĉi tiuj kvin sociformoj regis en la tiam Rusio kune, neniu tutece, kelkaj (1-a, 2-a, 3-a) estis mortantaj, kelkaj kreskantaj. Tri de ili estas kapitalismaj (2-a, 3-a, 4-a). (La "malgranda varproduktado" estis la etburĝa produktadmaniero). La ŝtatkapitalismo k socialismo havas progresivan karakteron, la ŝtato tial subtenis ilin. La patriarĥa kamparista mastrumado verŝajne nun jam estas tute aŭ esence foriginta. Kontraŭe la aliaj kvar ankoraŭ ekzistas, malgraŭ ke la relativa influo de la socialismo ege estas kreskinta. Ĉar faŝismo nur povas ekestigi en kapitalisma sistemo, estas la decida problemo, ĉu Sovetio estas ŝtatkapitalisma, socialisma aŭ ŝtato kun transira ekonomia strukturo.

SOCIALISMO EN SOVETIO?

La socialisma sciencaro promisas

1. internacian karakteron de la socialista socio, ĉar la socio estas pro la tutmonda kunlaboro k laborpartigo, estigitaj jam de la kapitalismo, nur konstruebla en tutmonda mezuro. Cetere estas la stalinista teorio pri la ebleco konstrui la socialismon en unu sola izolita lando, esence kontraŭevolucia, ĉar, por konstrui la soc. en iu lando, ekz. Sovetio, oni ja ne plu bezonas la internacian revoluciojn, kiu laŭ nia opinio estas necesa por la konstruo de la socialismo. (Tio kompreneble ne ekskludas ke oni en iuj izolitaj landoj povas komenci la konstruon de la soc. Sed perfekte estas la soc. nur konstruebla en tutmonda mezuro.) Laŭ la stalinista teorio estas la internacia revolucio ne nur nenecesa, sed eĉ danĝera, ĉar per la revolucio oni ja "kolerigas" la kapitalon k tiel malfaciligas la "socialisman konstruon" en Sovetio. La ŝovetia burĝokrataro, k kun ĝi la burĝaroj de la stalinisma Kominternco estas tial kontraŭ la internacia revolucio, k tial tendencas al la likvidigo de la Kominternco. La nova oportunistika politiko de la kominternco nur estas la unua etapo al la likvidigo de la kominternco. La "ruĝaj sindikatoj" ja jam estas likvidigitaj.

2. Neekzistenco de burĝokrataro. Burĝokrataro estas grupo de homoj kiuj per burĝokrataj rimedoj havigis al si la regadon en iu amasa organizo aŭ en iu ŝtato. Ĉar ĝiaj interesoj kontraŭas al la interesoj de tiuj kiuj enficiĝis la burĝokratojn (ekz. estas la ŝovetia burĝokrataro kontraŭ, la internacia proletaro por la internacia revolucio) povus la burĝokrataro ne longe daŭrigi la regadon, se ĝi ne povus sin teni ĉe grupo de privilegiitoj kies interesojn ĝi nun reprezentas. Tiel bazas ekz. la reformista burĝokrataro sur la "laborista aristokratio", la burĝokratoj de la kominternco havas sian bazon en la ŝovetiaj burĝokratoj. La ŝovetia burĝokrataro siaflanke fundamentas sur la lab. aristokrataro de Sovetio (teĥnikistoj, inĝenieroj, ŝtano-vlabristoj) k sur la etburĝaj kamparistoj. La faŝista burĝokrataro en Germanio, Italio k la "demokrata" burĝokrataro de la aliaj imperiistaj landoj baz-

LA PERM.REV.....DUA JARO.....SESA KAJERO.....DEK SEPA PAĜO

as sur la kapitalista klaso en ĉi tiuj landoj.

Ekzisto de burkrataro do estas pruvo por la ekzisto de privilegiitaj klasoj aŭ tavoloj, ĉar sen ties subteno la burkrataro baldaŭ estus disfaciligata. Aliflanke kondiĉigas la ekzisto de privilegiitaj klasoj aŭ grupoj la ekziston de burkrataro, ĉar la burkratoj estas agentoj de la reganta klaso aŭ grupo en la aliaj klasoj resp. grupoj.

Deklamaco de ŝtata aparato. Ŝtatoj estas aparatoj por subpremi la laborantajn klasojn. Tio ĉi povas pruvi analizante la konsiston de ŝtato. El kio konsistas ŝtato kutime? El armeo, polico, justico, parlamentoj burkratoj, ŝtataj entreprenoj, lernejoj, eklezioj.

Kiel la historio montras estas la armeo ĉefe uzata okaze de ribeloj de la lab.klasoj. Eĉ en socialdemokratiaj landoj oni uzas la armeon kontraŭ la laboristoj (Germanio-Noske). Cetere nur naivuloj povas kredi ke ekz. Danio, Norvegio k.a. malgrandaj landoj bezonas sian armeon por defendi sin en milito, kontraŭ kiu armeo povus sin ekz. defendi la malgranda armeo de Danio? Aŭ en kiu milito fariĝas la malproksima Norvegio areno de milito? La armeoj estas do ĉefe uzataj kiel ŝirmo de la reganta klaso.

Same la policoj. Ĉi tiu cetere kune kun la justico devas zorgi por la konservado de la ekzistantaj propraj formoj, t. s. por la konservado de la ekzistantaj rilatoj inter la klasoj.

Kiel armeo kaj policoj servas al la brutala subpremo de la lab.klasoj, tiel servas lernejoj kaj eklezioj al la ideologia subpremo. En la lernejoj oni nur lernas kio utilas al la reganta klaso. Neniu kapitalisma ŝtato - ankaŭ neniu socialdemokrata regato - ekzemple lasis instrui en siaj lernejoj la historion laŭ la historia materialismo, malgraŭ ke ankoraŭ neniu historiisto povis refuti la materialisman historikoncepton kaj malgraŭ ke la fluga historikoncepto havas evidentan kontraŭrevolucionan karakteron. Plue estas konate ke la "religio estas opio por la proleto" (Marks).

En la parlamentoj estas la popolo ne reprezentata sed vendata. Parlamentoj estas korupciejoj, partioj kiuj ne volas konfesi tion, nur montras ke ili jam mem estas korupciitaj. - La kontraŭrevolucionan karakteron de la burkrataro mi jam montris.

Tiel oni povas pruvi ke neniu ŝtato povas ekzisti en la social. = senklasa socio. Aliflanke devas en klasaj socioj la ŝtatoj ekzisti, kiel ili per subpremi la laborantajn klasojn. Ankaŭ laborista ŝtato ne faras escepton. Laborista ŝtato servas por subpremi la kapitalistojn. Ĉiuokaze ne plu ekzista en la soc.klasoj, do ankaŭ ne plu povas ekzisti tiam ŝtatoj. Sekve ne povas ekzisti "socialista ŝtato".

ĈU ŜTATKAPITALISMO EN SOVETIO?

Kiel ŝtatkapitalismon mi difinas: klasan socion en kiu la produktiloj estas propraĵo de la ŝtato, la ŝtato estas regata de burkrataro, la burkrataro do estas la nova reganta klaso. (Generale estas la burk. ne klaso sed parto de alia klaso.)

Klaso estas grupo de homoj kiu estas difinata per speciala formo de propraj formoj. (Bv. atenti ke la koncernaj difinoj en la Plena vortaro estas malgustaj kaj tipe burĝaj!). Kontraŭe estas "tavolo" nur parto de klaso. Ĉi tiuj vortoj havas ĉe la marksistoj precize difinitajn sencojn, kiu volas ŝanĝi ĉi tiujn kutimajn difinojn devas antaŭe pruvi, kial tio necesas. La sennaciistoj apartenas al tiuj, kiuj senkaŭze prenas aliajn difinojn, ĉe ili ne plu ekzistas diferenco inter klaso kaj tavolo. Per tiaj rimedoj oni kompreneble povas "pruvi" tion. Tiam oni ekz. ankaŭ povas pruvi ke sovetio estas "kapitalista" ŝtato.

Laŭ nia opinio estas la sovetia burkrataro tavolo interne de la (reganta) laborista klaso. Sovetio do estas lab. ŝtato, la necesa antaŭkondiĉo por la konstruo de la socialismo. La ultramaldeksuloj kontraŭe opinias ke S. estas ŝtatkapitalisma ŝtato, ke do unue la burkrataro estas klaso, due ke ĝi estas la reganta klaso.

Kontraŭe oni facile povas montri ke la burkrataro ne estas (kiel klaso) tute sendependa de la sovetia proletaro, ke ĝi nur estas tavolo interne de la laborista klaso.

Unue ja ankoraŭ ne okazis iu "kontraŭrevolucio" en Sovetio. Regantan klason oni povas faliigi ĉe bone evoluita policoj kaj militaparato nur per revolucio. Sed post la oktobra revolucio, kiu nekontesteble igis la laboristaron al la reganta klaso, ne plu okazis revolucio.

Duon estas la fakto ke la sovetia burkr. ne reprezentas la interesojn de la sovetia proletaro ne pruve por la aserto, ke la burkr. estas nova klaso. Ankaŭ en la reformistaj sindikatoj regas la reformistaj burkratoj kontraŭ la objektivaj interesoj de la laboristoj, tamen estas la laboristoj nekontesteble tiuj kiuj fakte regas en la reformistaj sindikatoj, ĉar en revolucia situo, kiam la diferenco inter la interesoj evidentiĝas ankaŭ subjektive por la laboristoj, fariĝas eĉ la plej reformistaj sindikatoj revoluciaj organizoj, ricevas rev. estraron ktp. Same okazos en Sovetio ĉe kresko de la revolucia movado. Tio ankoraŭ regas en Sovetio la propraj rilatoj, kiuj estas estigitaj

de la oktobra revolucio. Dum anbraj ekzistas ĉituj propraj rilatoj, oni ne povas diri ke ekzistas nova reganta klaso, la burokrataro. Ĉe plifortiĝo de la tutmonda movado, spec. en la okcidento de Eŭropo, de la prola revolucio, vidos la laboristoj en Sovetio ke la burokrataro ne reprezentas la interesojn de la laboristoj, sed proprajn, kontraŭrevoluciajn interesojn, ĉar la ideologio de la burokratoj, la teorio pri la "socialismo en unu lando", estas kontraŭrevolucia teorio. La laboristoj faligos la regadon de la burokratoj - ne per revolucio, ĉar la burokrataro ne estas klaso kiel ekz. la burĝaro - sed per siaj policakcionoj. Per tio estas montrita ke la sovetia buokr. ne estas klaso sed tavolo interne de la lab. klaso.

Ĉi tiu detala esploro pri la klasaj rilatoj en Sovetio montros ke ĉi tiu perspektivo estas la gusta, ke do la buokr. ĝis certa grado estas ankoraŭ kontrolata de la proletaro, ke la kontrolo pligrandiĝos ĉe plifortiĝo de la revolucio en la okcidento, ke do la buokr. ne estas klaso, do tute sendependa tiurilate de la proletaro, sed kontraŭe dependa de ĝi, ke ĝi nur estas parto de la proletaro.

Ĉi tiuj kontratuloj ankoraŭ ne sukcesiĝis doni al ni argumentojn kontraŭ ĉi tiu perspektivo. - Ĉar do la buokr. ne estas speciala klaso, sed nur parto de la reganta proletaro, estas evidente ke la diraĵo pri ŝtata kapitalismo estas sensenca, ĉar ŝtatkapitalismo nur povas ekzisti, se ankaŭ ekzistas klaso, kiu estas la reganta en ŝtatkap. socio. Ni ja ĵus montris ke tia klaso ne ekzistas, ke do Sovetio ankoraŭ estas ŝtato sub proleta diktatoreco.

Se la burokrataro estus klaso, tiam estus Sovetio ŝtatkap. ŝtato. Sed la buokr. nur estas parto de la reganta prol. klaso do ne povas temi pri ŝtata kapitalismo en Sovetio.

ĈU RUĜA FAŜISMO EN SOVETIO?

Sovetio do estas nek nure-socialista, nek nure-ŝtatkapitalisma ŝtato. Ankaŭ la privatkapitalo ne plu havas decidan influon, same ne la etburĝaro. La ekonomia strukturo de Sovetio estas transira.

Supre ni montris ke faŝismo nur ekzistas en kapitalisma socio, kun reganta financa kapitalo ktp. En Sovetio ne regas iu financa kapitalo (se jes, kiu do?), eĉ pri ŝtatkapitalismo, ĉe kiu do la burokrataro estus la nova reganta klaso, oni ne povas paroli. Mankas en Sovetio tute la ĉefaj premisoj por la ekestiĝo de la faŝismo (krom eble la etburĝaro, nome la kamparistoj).

Do la teorio pri la "ruĝa faŝismo" estas tute malĝusta k senbaza. Ĝi ne nur estas malĝusta, ĝi ankaŭ estas danĝera.

Kopenhago, 30-4-36 Ĉeĵo.

+++++ " L A G V I D A N T O . " +++++

La sekvantan citaĵon ni prenis el la ofic.org. de la leningr. distri sindikata konsilataro, "Ruĝa gazeto", de la 4-2-36.

"Nia tuta amo, konfido, forto, koro, hercismo, vivo... ĉio estas por vi, prenu ĝin, granda STALIN, ĉio estas via, gvidanto de la granda hejmlando. Disponigu pri viaj ĉefiloj, ili movu sin en la aero, sub la tero, en la akvo k en la stratosfero. La homoj de ĉiuj tempoj k popoloj nomos vian nomon kiel la plej ravigan, fortan, saĝan, belan. Via nomo staras sur ĉiu fabrikejo, ĉiu terpeco, en ĉiu homa koro. Se mia amata edzino naskos al mi infanon, estos la unua vorto kiun mi instruos al ĝi: "S t a l i n !" "

La skribmaŝino rifuzas, skribi pluen. -

+++++ SENNAĈIISTA MENSĜO. - En n-ro 5-a de Herezulo oni povas legi: +++++

"...la historia materialismo eraregas, malatentante la sentojn k ideojn..." Ĉar la senn. ne havas argumentojn, ili devas kontentigi per mensĝoj. La difino por hist. mat. estas: La ekon. substrukturo (=produktmaniero, produktfortoj, teĥniko, klasaj rilatoj ktp) destinas la ideologian superstrukturon (religio, superstiĉo, juro, moralo, scienco, tendencoj ktp) kiu reagas sur la ekonomian substrukturon. Ĉar sennaciisto povas el tio konkludi ke ni malatentas la "ideojn"...

+++++ REDAKCIAJ KOMUNIKOJ: - La sepa kajero de la "permanenta" enhav. la +++++

militezojn (La 4-a int. k la milito) ankoraŭ foje en formo de broŝuro ĉar ili vekis tiel grandan intereson. Ankaŭ la formo de la daŭriga aperigo estis malbona. Plue diversajn aldonojn, ankoraŭ nepublikigit.

MI NUN ANKAŬ AKCEPTAS ANONCOJN: Prezo por ĉiutaga anonco 5 dkr, por 1 linio 0,25 dkr, por 1 litero 0,05 dkr, minimume 0,30 kronojn por unu anonco = 1 intern. poŝta respondupeco.

MI SERĈAS AGENTOJN EN ĈIUJ LOKOJ K LANDOJ. Kondiĉo: La agentoj devas memestablon abonantoj, ili ricevas 20% por ĉiu anonco, abono ktp havigita al ni. Je monopola agentejo ni nur konas 0,10%.

Kopenhago, 2-5-26 Admin.

+++++